

Heinrich Heine,  
Lorelej'  
*tradukita de Leopold Elb*

*Tiu traduko estas poste iom modifita de aliuloj, ne estas la origina traduk-versio de Leopold Elb.*

Ne scias mi, kial mi estas  
Malgaja en la kor'.  
Antikva fabelo restas  
Por ĉiam en mia memor'.

Vespero jam ekmalheligas,  
Fluadas la Rejn' en trankvil',  
La supro de l' monto lu-miĝas  
En vespersuna bril'.

Belega knabino jen tronas  
Kun ora juvelar',  
La belan vizaĝon kronas  
Mirinde la ora harar'.

Si uzas kombilon el oro  
Kaj dume kantas si.  
Mirige tušas al koro  
Sorĉiga la melodi'.

Kaj sopiregon eksentas  
Ŝipisto dum sia veter';  
Rifaron li ne priatendas,  
Al monto rigardas li nur.

Mi kredas, ke dronus finfine  
Ŝipisto kun sia boat',  
Kaj tion kaŭzis feine  
La Loreleja kantad'.

Heinrich Heine,  
Lorelay  
*tradukita de Hans-Georg Kaiser*

*An ancient legend of the Rhine*

Min kaptas malgaj' en la koro,  
pro kio tia trist'?  
Fabel' el antikva foro  
ne lasas de mi kun persist'.

Aere fridetas, trankvilas,  
malhelas jam la Rejn'.  
La monto surpinte brilas  
vespere en rava scen'.

Tre ĉarma feino sidas,  
jen supre por ador';  
la ora ornamo ridas;  
si kombas harojn el or'.

Si kombas per ora kombilo  
kaj kantas kun pasi';  
mirigas min la elbrilo  
kaj forto de l' melodi'.

Ŝipisto ŝipeton gvidas,  
lin kaptas ve' de ekzalt'.  
Li ja la rifojn ne vidas',  
li vidas nur supren sen halt'.

Mi kredas, ke ondoj tiras  
la ŝipon funden de l' Rejn';  
kaj tio de l' kant' eliras  
de Lorelaj-siren'.

Heinrich Heine,  
The Lorelei  
*tradukita de Mark Twain*

*I cannot divine what it meaneth,*

*This haunting nameless pain:  
A tale of the bygone ages  
Keeps brooding through my brain:*

*The faint air cools in the gloaming,  
And peaceful flows the Rhine,  
The thirsty summits are drinking  
The sunset's flooding wine;*

*The loveliest maiden is sitting  
High-throned in yon blue air,  
Her golden jewels are shining,  
She combs her golden hair;*

*She combs with comb that is golden,  
And sings a weird refrain  
That steeps in a deadly enchantment  
The listener's ravished brain:*

*The doomed in his drifting shallop,  
Is tranced with the sad sweet tone,  
He sees not the yawning breakers,  
He sees but the maid alone:*

*The pitiless billwos engulf him!  
So perish sailor and bark;  
And this, with her baleful singing,  
Is the Lorelei's gruesome work.*

...

...

...

*Traduko de la Germana poemo “Die Lorelei” de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de LEOPOLD ELB (†1912-08.04).*

Arg-2-71 (2005-02-03  
19:06:30)

*La traduko troviĝas sur paĝo 84  
de la lernolibro „Post la kurso“  
de Wilhelm kaj Hans Wingen,  
eldonita de Ludwig Pickel en  
Nurembergo (Nürnberg), Ger-  
mania.*

*Traduko de la Germana poemo  
“Die Lorelei” de HEINRICH HEI-  
NE (\*1797-12-13 – †1856-02-17)  
en Esperanton de HANS-GEORG  
KAI SER (Cezar, \*1954-05-21).*

Arg-2-564 (2005-02-03  
19:18:09)

*Traduko de la Germana poemo “Die  
Lorelei” de HEINRICH HEINE (\*1797-  
12-13 – †1856-02-17) en la Anglan de  
Mark Twain.*

Arg-2-11 (2003-10-13 04:42:59)

*A Tramp Abroad. Vol 1-2. Leipzig:  
Tauchnitz, 1880 Band I, Mark Twain  
1880 (rf. <http://www.loreley.com/loreley/marctwai.htm>)*